# *Prezidento de Palestino en Kubo por ?eesti la Pintkunvenon de G77*




Havano, sep 14 (RHK) La prezidento de Palestino, Mahmud Abbas, estas jam en Kubo por partopreni en la Pintkunveno de la Grupo 77 (G77), kiu okazos la 15-an kaj 16-an de septembro sub la temo “La defioj evoluo: rolo. de scienco, teknologio kaj novigado.

Alveninte al la flughaveno José Martí en Havano, Abás kaj la akompananta delegitaro estis akceptitaj de Walter Baluja, kuba ministro pri supera edukado.

Pasintlunde, la palestina ?efministro, Mohammad Shtayyeh, konfirmis la ?eeston de la prezidento al la kunveno en la plej granda el Antiloj, parolante en la semajna kabineta kunveno.

Gvidantoj kaj personecoj el pluraj landoj konfirmis sian partoprenon en la Pintkunveno, kiu okazos ?i-vendrede kaj sabaton en la Havana Kongresa Palaco en Havano.

Kubo tenas la portempan prezidantecon de la Grupo 77 kaj ?inio ekde januaro de la kuranta jaro.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/333911-prezidento-de-palestino-en-kubo-por-ceesti-la-pintkunvenon-de-g77

**Radio Habana Cuba**